

## & La nova jar':

< Rekante 25 el 61 batoj por strofo, entute 488 paŝoj dum 6 minutoj. Verkis Raymond Schwartz (Verdkata testamento, 1929) kun enkonduko: (Laŭ germana modelo de Sigmar Mehring) kaj titola piednoto: (\*) Melodio germana "Oh Tannenbaum...". Baladigis Martin Strid (2016) per tiu melodio kaj nova rekantaĵo.>

### (#Melodio:

<:61> (

o;So /dodo do ore mimi mi i;mi remi fa Ti re do o;so somi la aso sofa fa a;fa fare so ofa fami mi; So dodo do ore mimi mi i;mi remi fa Ti re do :35

(#Rekantaĵe: o;so somi la aso sofa fa a;fa fare so fa fami mi; So dodo do ore mimi mi i;mi remi fa Ti redo do do) :24

)x8 )+

### (&Strofoj:

'1 La /Nova Jar', La Nova Jar' ; La homojn plibonigas! ; Sur ĉiu strat', en ĉiu dom' ; Afabla estas ĉiu hom' ; La Nova Jar', la Nova Jar' ; La homojn afabligas!

(x:; **La nova jaro venas jam ; kaj estas nia finproklam': ; La homojn vidu ni kun am' ; almenaŭ unu nuran tagon.**)

'2 La pordistin', la pordistin' ; Nun ĉiam bonhumoras! ; Antaŭe vane kaj sen fin' ; Dumnokte mi petegis ŝin, ; Sed nun ŝi enirigas min ; Tuj kiam eksonoras! .....

'3 La poŝtportist', la poŝtportist' ; Deĵoris tre malbone! ; Ne venis li dum pluvveter' ; Kaj nur malofte dum somer', ; Sed eĉ por simpla cirkuler' ; Li venas nun persone! .....

'4 Kaj la barbist' traktadis min ; Samkiel malamikon! ; Li senhezite, laŭ okaz', ; Detranĉis pecon de la naz', ;

Kaj li al mi sen parafraz' ; Manĝigis la penikon! .....

'5 Sed la barbist', sedla barbist' ; Min razas nun senvunde! ; Kaj kun ĝentila kompliment' ; Li diras, plena je atent': ; "De viaj haroj cent po cent ; Rekreskas tre abunde!" .....

'6 Kaj malfidela amatin', ; Al kiu mi min donis, ; Kaj kiu laŭ infera plan' ; Min trompis kun amerikan', ; Ŝi skribis ĵus per propra man' ; ... Ke ŝi al mi pardonis!! .....

'7 Restoracia ĉefkelner', ; Li estis ĉefbarbaro! ; Al mia frako kaj kravat' ; Ŝprucigis saŭcon kun salat', ; Sed denun li pro korkompat' ; Ĝin verŝas al najbaro! .....

'8 Ho Nova Jar', mi amas vin ; Pro via dolĉa paco! ; Sed diru, ĉu sincere vi ; Tutsola sorĉas ĉion ĉi, ; Aŭ ĉu ĝin faras multe pli ; Nur la Novjar-Donaco?? .....